

# kontakto

*tutmonda  
esperantista  
junulara  
organizo*

n-ro 4  
aŭtuno 1964

# kontakto

n-ro 4  
aŭtuno 1964

Organo de Tutmonda Esperantista  
Junulara Organizo  
(Junulara Sekcio de UEA)

**Prezo:** individua numero - 2,20 ned. gld.  
(9 steloj)

Jarabono (minimume kvar numeroj) -  
8 ned. gld. (32 steloj)

Redaktoro: Humphrey Tonkin,  
7 Linnaean Street, Cambridge 38,  
Mass., Usono

Teknika redaktoro: Adriaan den Haan

Reklama Redaktoro: James May

Desegnisto: Jan Schaap

Administrantino: Elly Wijnands

**Administrejo**, al kiu oni sendu ĉiujn  
abonkotizojn, reklamojn ktp.:

Kontakto, Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176,  
Rotterdam-2, Nederlando

**Bankisto de UEA:** R. Mees & Zoonen,  
Blaak 10, Rotterdam-1

**Presisto:** Drukkerij Zwagers c.v.,  
Nieuwe Binnenweg 460, 462,  
Rotterdam-6, tel. (010) 5 66 45

**Reklamtarifo:** La redakcio liveros kontraŭ peto. Ekzistas speciala malalta tarifo por esperantistaj entreprenoj.

**Manuskriptojn** por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto, kaj ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj kun granda maldekstra margeno. Sendu materialon aerpoŝte. Ĉe leteroj destinitaj al aperigo oni sekvu la samajn instrukciojn.

**La redaktoro aparte bonvenigas** artikolojn originalajn aŭ tradukitajn pri temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn, kun aŭ sen artikoloj. Ĉiu materialo havu iun apartan intereson por la ju-

nularo kaj artikoloj prefere estu verkitaj de gejunuloj mem.

La redakcio de Kontakto ne akceptas respondecon por la opinioj esprimitaj en subskribitaj artikoloj, kiuj ne necese akordiĝas kun la opinioj aŭ principoj de TEJO. Por la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem.

Krome, la redakcio rezervas al si la rajton mallongigi aŭ alimaniere adapti subskribitajn artikolojn laŭ sia bontrovo.

**La fondaĵo junulara gazeto** estas oficiala fondaĵo de UEA kaj ĝia celo estas subteni la gazeton de TEJO dum ĉi tiu frua periodo de ĝia eldonado. Kontribuaĵojn oni faru rekte al UEA aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ al estraranoj de TEJO.

## ENHAVO

- Douglas Kennedy:  
Pluvivoj de la dancoj de  
praaj epokoj . . . . . 1
- Niaj humoristoj . . . . . 4
- La Novjorka Mond-Foiro 6
- Mozaiko . . . . . 14
- Evgeni Konstantinov:  
Thomas Alva Edison . . 16

# Pluvivoj de la dancoj de praaj epokoj



Starante antaŭ la bestfiguroj pentritaj sur la murojn de la grotaj de Lascaux, en Francujo, mi klopodis imagi kiel aspektis kiam tie laboris la pentrintoj antaŭ 40.000 jaroj. Tiel granda tempo-salto postulas apartan strebon de la pensoj. Je mia aĝo, facilas retrospensi kvindek jarojn kaj, kun eta peno, pliajn kvindekojn. Dek kvindekoj portus min al la angla reĝo Henriko la Sepa; dek ok kvindekoj, al la jaro de la normanda invado de Anglujo en 1066, estus iom pli malfacila salto; okcent, al la jaro 38.000 antaŭ nia erao, estas multe malpli facila, sed post transsalti tiun barilon, mi pretas por plia mensa alĝustigo for de mia moderna psikologio al la signifo de geologia tempo.

Inter la bildoj sur la muroj, klare alia ol la vivoplenaj formoj de bubaloj, ĉevaloj kaj cervoj, estas iu besta klaŭno, sceneja ĉevalo, pli homa ol besta. En alia groto, pli sude, troviĝas la "Sorĉisto", kornposeda homo-cervo staranta per la malantaŭaj kruroj. Jen plia mensa alĝustigo necesas por koncepti la gradon de intimo kiu tiam nepre ekzistis inter ĉasanto kaj ĉasato — kaj kiu instigis tian maskeradon kiu ebligis al la grotpentristoj transigi sur la grotajn murojn siajn internajn sentojn pri la bestoj.

Sed ĉi tiuj ŝtonepokaj figuroj de antaŭ

kvardek jarmiloj estas ero de tradicio de maskitaj dancantoj kiu daŭris en nian propran epokon. La bestoj estis la dioj de la ĉasistoj, simboloj de la kontinueco de ilia propra vivo, simboloj kiuj ankoraŭ signifoplenis eĉ post kiam la homo ĉesis ĉasi kaj komencis paŝti la bestojn kaj kolekti kaj disigi semojn por regula rikoltado. Virŝafojn oni oferis kiel bruligitajn didonacojn. Eskapokapojn ŝarĝitajn de pekoj oni forpelis en la dezerton por liberigi la homon de la riskoj de malabundo kaj diablajoj. Ĉi tiuj fruaj ritoj daŭris eĉ post kiam la tribo vivo cedis antaŭ ekloĝo en urboj. Pluraj centroj de civilizo evoluis pli-

malpli sendepende kun la propraj lokaj dioj, sed kun komunaj bazaj motivoj de konflikto inter vivo kaj morto, de morto kaj reviviĝo, de fekundigo de la Tero-patrino per la Ĉiela Dio, kaj de la danca reveno de la vivo ĉiujare por nutri kaj subteni la homaron.

En la fruaj komunumaroj de Mezopotamio, Egiptio kaj Hindio ekevoluis kultodramo laŭ tiu ĉiujara batalo inter vivo kaj morto je kies rezulto dependis la estonteco de la homo. Pro pli granda apogo je agrikulturo, la akvo de Babilono kaj la inunda Nilo de Egiptio identiĝis kun novaj simpatiaj dioj kaj minacantaj drakoj kiuj kun-



1. La ritoceremonioj de la homo de la ŝtonepoko verŝajne centriĝis ĉirkaŭ la ĉasanto kaj la ĉasato, kaj evoluigis iuspecan magian rilaton inter ili. Tia estas la homo-besto, kutime nomata la "Sorĉisto", el la grotopentraĵoj de suda Francio

2. Bastondancantoj en Headington, Anglujo

3. La ĉiujara Kornodanco de Abbots Bromley, Anglujo, pluvivas sub la egido de la eklezio. Jen la dancestro kun siaj cervokornoj

4. Dancantoj suprensaltas en la danco "Rajdantoj", el Rumanio

5. Sezona danco el tute alia mondoparto, en la provinco Jang Tse, Ĉinio



batalis ĝis la venko de pluvado kontraŭ sekeco. Nova speco de Vetera Dio, aŭ Ĉiela Dio, anstataŭis la pli fruajn Arbajn Diojn kaj Bestajn Diojn, kaj edziĝis kun la antikva Tera Diino kiu travivis fekundigon kaj naskigon. La Ĉiela aŭ Vetera Dio havis diversajn nomojn en diversaj landoj — *Faunus*, *Adonis*, *Attis*, *Baal* kaj *Osiris*. Li ludis sian rolon en la Printempa Festivalo kiam li redonis fekundecon. Lia simbolo de nova vivo estis la daŭre verda majstango, aŭ iu flagstango sur kiu pendis la felo de juna ŝafido. Antaŭ proksimume 5.000 jaroj komenciĝis granda migrado de homoj, kiuj onde eliris la Orienton kaj Nord-orienton kaj disvastiĝis okcidenten de Hindio tra Etazio al Greklando, al Sicilio, kaj trans Eŭropo. Komenciĝinte en la Bronzepoko kaj daŭrante tra la Ferepoko, ĉi tiu disvastiĝo de hindoeŭropanoj kunportis kulturojn kiuj intermiksiĝis kaj fandiĝis kun aliaj kaj denove antaŭeniris kun kulturaj elementoj transprenitaj survoje. Unu el iliaj Ĉielaj Dioj, *Zeus*, forpelis siajn rivalojn en Grekujo, sendante ilin al "Limbo". La hindoeŭropanoj kiuj koloniis Grekujon ankoraŭ festadis printempon per fekundigaj ritoj, cele al daŭrigo de kontakto inter la homo kaj la bestoj kaj kreskaĵoj, kontakto tre trankviliga por kamparanoj kaj paŝtistoj. Per siaj panegiroj, siaj komunaj festoj de sankta viando, siaj festivaloj de muziko kaj dancado kaj ludoj, la grekoj festis la semadon kaj la rikolton. La virinoj havis la proprajn ritojn por sia Terpatrino-Diino, *Demeter*, kaj ŝia grenfilino, *Kore*, kiu lokigis la festivalon de semado en majo.

La grekan eskapokapron oni kondukis tra la stratoj kaj vipis per verdaj branĉoj por nuligi la pekojn. En kamparaj regionoj la dancantoj — por antaŭenigi fekundon — kantis kaprokantojn aŭ Komoj kiuj poste transigis ilian dramokul-ton en klasikajn komedion kaj tragedion. En Kreto la viraj dancantoj dediĉitaj al Kore (la t.n. Kuretes) akiris la specialan nomon *Mystae*, pro la magia vivokuracilo kiun ili disdonis dum ili forpelis morton kaj malbonon dum sia torĉa procesio. Tiu procesio reviv-

vigis la serĉadon de la forprenita Kore. En Romo, la dudek kvar viraj dancantoj estis dediĉitaj al Marso, la dio de la unua monato, marto. Ĉiuj portis bastonojn dum ili marŝis tra la urbo, haltante ĉe certaj punktoj por "ludi" sian kuracan dancon kaj por instigi kreskadon. Dum la Festo de la Luper-calia, la junaj viroj, post ol ili estis "sangumitaj" (ŝmiritaj per sango), dancis tra la stratoj vipetante la virinojn per la pintoj de strioj de kaprohaŭto, por igi ilin fekundaj kaj certigi facilan akuŝon. Ili estis pastroj de Faunus aŭ Pan, la hindoeŭropa dio de arbaroj kaj de la paŝtistoj, kiuj lin rekonis pro liaj hufaj piedoj kaj oreloj kaprosimilaj. Ankoraŭ hodiaŭ en Trakio la dramokul-ton ludas homoj vestitaj per kaprohaŭtoj kaj portantaj bastonojn. Unu el ili, la "forĝisto", "ludas" la forĝadon de fera plugilo kiu perforas la Terpatrino-n. Ido naskiĝas, kreskas ĝis matureco, rite murdiĝas kaj reviviĝas denove por igi la grenon kreski; en ĉesto de groteskaj dioj ĉiuj poste fariĝas burleskuloj kaj klaŭnoj.

La grandaj migradoj de ĉi tiuj ferepokaj kuraculoj antaŭ kvin aŭ ses jarmiloj portis tiajn printempfestajn ritojn trans Eŭropo de la Balkanaj landoj al Hispanio kaj Portugalio, de Sicilio norden al Skandinavio kaj Britio. Post paŭzo en Eŭropo de kelkaj miloj da jaroj, ili antaŭeniris denove trans la Atlantiko al Meksikio kaj



Brazilo. En Centra kaj Suda Ameriko la eŭropaj bastondancantoj kun siaj klaŭnoj kaj bestrolantoj miksis siajn kutimojn kun similaj indiĝenaj kutimoj kiuj apartenis al alia familio de dioj.

Mi havis la plezuron dum mia vivo vidi grupojn de tiuj bastondancantoj en diversaj landoj. Ili portas stangĉevalojn aŭ stangkaprojn, kaj bestajn maskojn; ili dancas serpentodancojn; ili flirtigas siajn rubandojn, tintigas siajn sonorilojn kaj kunbatas siajn bastonojn — ĉio ĉi por fabriki vivigan "medikamenton" — kaj ili dancas procesie por ĝin disdoni tra siaj komunumoj.

En la kamparo de Rumanio la dancantoj "Calusari" posedas kuracon por malsana infano tiel alte taksatan kiel botelo da moderna medikamento. En Makedonio, oni supozas ke la "Rusallia" pligrandigas la eblecon ke knabino edziniĝos. Ĉi tiun printempan dancon oni mendas egale por la bestoj kiel por la plantoj. Eble temas nur pri simpla postrestaĵo de nia pagana epoko, sed en ĉi tiuj kamparaj regionoj la antikva identigo kun la Naturo, kun la besta mondo kaj kun la kreskantaj kultivaĵoj, estas ankoraŭ multe pli ol surfaca.

En Anglujo ni rekonas la Printempan Festivalon de la antikvaj kuraculoj per nia "Morris Dance". Je la unua de majo aŭ je pentekosto, la blankvestaj Morris-dancantoj, kun festonoj de floroj, flirtantaj rubandoj kaj tintantaj sonoriloj, marŝas flirtigante siajn blankajn tukojn kaj kunbatante siajn stangojn, tra la vilaĝoj. Ili haltas ĉe diversaj lokoj kie ili fabrikas "medikamenton" por la koncerna komunumo. Kun ili estas eble klaŭno kun bovina vosto kaj porka veziko, iuspecaj besthomoj kaj eble groteska virinrolanto — iu "Baba" aŭ "Betty" aŭ "Maljuna Patrino". Eĉ se oni tute nenion scias pri la fono de ĉi tiuj "antikvaĵoj", ili strange kaptas la atenton per sia "ludado" kaj sia proksima rilato kun la grupo de dancantoj mistike atentantaj sian riton.

En la moderna Hindio, la bastondancantoj en siaj senmakulaj vestoj kreas novan vivon per sia ludkuraco. En apuda Cejlono, oni ludas en izolaj vilaĝoj dancajn dramojn de la antikva fekundiga formo, kiuj pli antikvas ol hinduismo kaj budhismo. La dancantoj, kiuj portas blankajn vestojn kaj kiuj estas viroj malgraŭ la "mamoj" kudritaj al iliaj kostumoj, estas dediĉitaj al la Tera Diino, patrino de



fekundeco. La Ĉiela Dio ankaŭ pluvivas en Cejlono, kun sia "stango", laŭ kiu li mem suprengrimpos portante sian simbolan fajrotorĉon.

La salto de Cejlono al Meksikio, kvankam longa laŭ distanco, ŝajnas kunfandi la epokojn, ĉar troviĝas meksikia Ĉiela Dio kun sia alta stango de kies pinto liaj dediĉitaj kuraculoj sin jetas, la kapon malsupre, por "flugi", ĉiu sur etendiĝanta "trapezo", ĝis ili atingas la ricevantan teron per sia inversigita magia tuŝo.

En aliaj mondopartoj kutime troviĝas la magio en salto supren kaj ne malsupren. La saltantaj baskoj prancas alten por bonaj rikoltoj, kaj levas unu el siaj iniciatitoj alten sur ŝildo de bastonoj. Iliaj bastonoj estas etaj "stangoj" riĉaj je la magio de arboj, simboloj de la ĉiam verda kaj ĉiam renoviga vivo, kaj kapablaj forbati kaj forpeli la morton. Kun tia vergo ĉiu dancanto estas magiisto, ankoraŭ farante la sorĉojn de la Terdiino kiun li tiel longe reprezentis.

La blankrobaj bastondancantoj de Miranda, en Portugalio, havas virinecan aspekton. Ĉu ili estas pastroj aŭ terpatrinoj aŭ duonviroj-duonvirinoj? En Hindio la virinoj ankoraŭ dancas bastondancojn por fekundo kaj ekzistas ritaj dancantinoj en Rumanio, Bulgario, Hungario kaj kelkaj aliaj landoj de Centra Eŭropo. Sed ĝenerale la kristanismo, en sia batalo kontraŭ paganismo, tute ne toleris la evidente virinan flankon de fekundeco. La Terpatrino estis la ĉefa malamiko. Eble pro tio la dancutimoj de la virinoj en Britio kaj la plimulto de aliaj landoj malpermesigis kaj estis pelitaj en kaŝon, aperonte poste en formo de sorĉismo.

Lastatempe okazis ĝentilaj invadoj de virinoj en la tradicion de la viroj. En regionoj de la britaj provincoj Lancashire kaj Cheshire la junulinoj transprenis la lokan Morris-dancon kaj aliigis ĝin en karnavalan paradon kun tioma firmeco, ke oni emas konjekti ke la modo de marŝaj procesioj kaj paradestrinoj en Usono, Sudafriko kaj Novzelando eble estas virina instinkto regajni siajn rajtojn al loko en la antikva tradicio.

La viroj plejparte ĵaluza konservis sian monopolon de la ceremoniaj ritaj dancoj, kaj ili iumaniere travivis jarcentojn de malpermesoj flanke de la Eklezio.

Ekzistas kazoj kie lokan dancriton prenis sub sian egidon la eklezio kristana, kiel ekzemple la ĉiujara Kornodanco de Abbot's Bromley en la provinco Staffordshire, kaj la ankoraŭ pli rimarkinda ekzemplo de la dancantoj de Corpus Christi en la katedralo de Sevilla. Pro unu kialo aŭ alia la bastondancantoj konservis sian ĉiujaran riton kiel vivan tradicion en multaj kristanaj landoj en Eŭropo, kvankam la plena signifo de la rito ŝrumpis al nebula eĥo el fora pasinteco.

Post la firmiĝo de kristanismo, la paganaj dioj estis devigitaj transiri al la ankoraŭ pli antikvaj fantomoj en Limbo, sed iliaj spuroj postvivis inter la "klaŭnoj" kaj "pseudokuracistoj", la "ĉevaloj", "kaproj", "drakoj" kaj "Sanktaj Georgoj" — verdaj homoj kiuj saltetas jen ĉi tie jen tie ĉirkaŭ la bastondancantoj dum ili batas, klakas kaj sonoras por antaŭenigi la ĉiujaran venkon de vivo kontraŭ morto.

Douglas Kennedy

## ROMAN DOBRZYNSKI

### ELSTARA ESPERANTISTO

Kowalski estis elstara esperantisto kaj ĉiujn rigardis desupre. La naturo multe kontribuis lian elstarecon regalante lin per sufiĉe alta staturato. Oni montris lin dirante: "Jen, la elstara esperantisto!" Sed tio ne sufiĉis al Kowalski, kiu estis tre ambicia homo. Li kutimis diri: "Nia ideo postulas, ke ni mem estu ĉe pinto de la socio por havi larĝan horizonton."

Li do sindone kaj ofereme iris pli kaj pli alten, ĝis li foje atingis la pinton de la lanterno. Jen, mi vidas lin sidi supre sur la lanterno kaj admiru pilargiĝintan horizonton. Mi estis edifita de la aŭdaca ago de mia, kiel ajn estu, amiko kaj samideano, kvankam envio min boris interne. Nun Kowalski elstaris sendube kaj ne eblis minaci lian elstarecon.

Post kelkaj horoj, eksentinte malsaton, li decidis malsupreni sed li rimarkis min kaj restis supre por gardi la postenon. Mi flankeniris. Tamen okazis, kion mi supozis. Kiel sciante descendi estas pli malfacile ol supreniri. Se oni iras alten, necesas certigi al si sekuran revenvojon. Kowalski ne sciopovis surteriĝi de la lanterno. Li malhisiĝis je unu metro. Stop! Nek unu centimetron plu! Ĉirkaŭbrakante la lanternon li svingis per la gamboj konsternite.

Fine plorvoĉe li alvokis min unuan... kvinan... dekan fojon. Nu, oni devis savi la amikon. Mi alvenis, demetis la jakon, suprenfaldis la manikojn, kraĉis en la manplatojn kaj ĉirkaŭprenis la lanternon por suprengrimpi al la endangerigita kolego. Mi ekĉerpis plenajn pulmojn da aero kaj.... rigardinte ĉirkaŭe mi decidis atendi ĝis kiam kolektiĝos iom da homoj. Fakte Kowalski ĝemis, ke li ne plu povas sin teni, tamen mi kredis, ke li komprenos la propagandan signifon de la okazantaĵo kaj suferos volonte ankoraŭ kelkajn minutojn.

Li kripetis savon pli kaj pli laŭte, do baldaŭ kolektiĝis amaso da homoj. Ĉiu demandis, kio okazis. Responde mi montris al Kowalski kaj parolis pri la Ideo. Kiam sur la strato ekmankis loko por la ĉiam pli kreskanta popolamaso, mi demetis la ĉemizon, ekĉerpis aeron, streĉis muskolojn....

La rigardantoj ekmuĝis pro ravo. Tiam mi ekimadis al mi, kiel belege aspektus la muskoloj en televidiloj. Oni devus venigi la Televidon. Mi ekiris telefoni, sed jen mi vidas knabon salti sur la lanternon kaj grimpi

al Kowalski. Apenaŭ mi sukcesis lin kapti je la pantalono kaj tiamaniere devigi lin malsupreni.

"Kien, nazmukulo?!" mi ekkriis kolere kaj tordis la knabon je orelo. "Ĉu vi ne vidas, ke estas mi, kiu savas sinjoron Kowalski!"

"Ho, fripono, batas infanon!" bolis la homamaso, "Ĉiu rajtas savi la viktimon!"

"Absolute, ne!'" mi kontraŭstaris. "Sinjoro Kowalski estas mia amiko kaj samideano. Nur mi rajtas lin savi. Ja oni scias, kiel helpemaj estas la samideanoj. Mi ne estos alia!"

Ektondris kriegoj. Tiun ĉi etan miskomprenon elprofitis iu fiulo. Antaŭ ol mi rimarkis, li jam estis ĉe duono de la lanterno. Mi tuj postsekvis lin kaj kaptis la aĉulon dum li estis preskaŭ atinganta samideanon Kowalski.

"Lasu mian amikon!" mi ordonis. Ĉar li ne obeis, mi ekmordis lian femuron. Poste.... kio okazis poste mi ne tro ekzakte memoras. Estas tamen certa fakto, ke tiu fripono ne sukcesis savi nian samideanon (ho, diabloj prenu tiun ĉi gipson!). Mi ankaŭ ne helpis al Kowalski, sed kulpas li mem, ĉar li ne estis sufiĉe pacienca.

Ĉiam mi diris: "Ju pli alten oni grimpas, des pli danĝera estas eventuala falo". Tio ne rilatas kompreneble al Kowalski, kiu verdire ankaŭ falis, sed ambicio ne permesis al li ne plu esti elstara, li do reflegis unu momenton poste supren.... al la Ĉielo.

Oni skribis epitafon:

Vi, de l'Ideo fidela servanto,  
Post konsidero respondu al mi:  
Ĉu dank' al vi famiĝas Esperanto,  
Ĉu dank' al Esperanto — vi?

### MONUMENTOJ

Laŭ malnova tradicio ĉiuj loĝantoj de nia urbo estas tre famaj. Ne miru do, ke ĉiupaŝe vi vidas en la urbo monumentojn, ĉar ĝuste en ili estas enŝtonigita glora grandiozo de pasintaj kaj daŭrantaj tempoj de la urbo. En la hodiaŭa sovaĝe rapida mondo trezoraj valoroj de la homa menso, animo kaj sperto falas en malmemoron, se oni ilin tuj ne presas, surbendigas, arkivigas aŭ monumentigas. Ni ĝuste monumentigas nin, ke la posteuloj vidu, kiu al ili sinoferadis. Cetere dank' al

monumentoj la urbo interese aspektas. Rigardu: ĉie blokoj, kolonoj, marmoroj, granitoj, memortabuloj, oraj literoj. Rava vidaĵo!

Eble vi opinias, ke sole riĉuloj havas siajn monumentojn? Ho, tute ne! Ekzemple maljuna Johano la Apudpreĝeja la tutan vivon almozis por monumento kaj fine konstruis al si vere imponan obeliskon. La aliaj same peze laboras kaj rifuzas al si ĉiujn plezurojn, ŝparante por digne sin eternigi, ĉar, kiel diras la popola proverbo: "sen laboro kaj pento ne estas monumento".

Nia urbanaro ne avaras tempon kaj monon. Nenio mirinda, ke la rezultoj estas imponaj. Kiel montras Gallupstatistiko, tie ĉi al unu kvadrata metro konformas 0,3 da monumento. Estas do klare, ke laŭ monumentoj nia urbo absolute distancigas la ceteran mondon; pro tio ĝi prezentiĝas alloga kuriozaĵo por turistoj. Estas io ne forgesebla promenadi tra niaj stratoj. Oni sentas sin digne kaj solene vidante ĉie monumentojn. Sur la Centra Placo ili estas cent dudek tri.

Lastatempe mi gvidis tra la urbo amerikanon. Al tiuj abomene praktikaj antipodoj tute fremdaj estas sentimentoj. Pri tio mi ĝuste konvinkigis, ĉar mia gvidato ankaŭ ne kapablis kompreni la sublimecon de la tradicio. Promenante kelkajn horojn inter la monumentoj li diris: "Eĉ ĉe ni en Ameriko ne ekzistas tiel imponaj tombaroj."

*Inter la parolantoj de Esperanto abundas humoristoj. Estas eĉ kelkaj intencaj humoristoj. Sed ili emas famiĝi nur en unu eta medio kaj ne atingi la kutime dignan kaj rigide seriozan internacian gazetaron. En la serio Niaj Humoristoj ni intencas prezenti kelkajn tiujn junulojn kiuj surprizis la esperantistajn gamikojn per la kapablo ridi — kaj ridigi. Kaj parolantoj de Esperanto ja bezonas tiun kapablon...*

### Lernado per eraroj

Por ĝui viv sukcesojn  
Lernadu, karaj fratoj,  
Ne pere de eraroj,  
Sed universitatoj.

### Ĉu eblas?

Ĉu eblas loĝi en barelo?  
Ĉu eblas vivi sen viskio?  
Ĉu eblas lerni dudek lingvojn?  
Eblas — sed por kio?

### NIAJ KONTRIBUINTOJ

**Douglas Kennedy** estis direktoro de la Angla Popoldanca kaj -kanta Asocio de 1925 ĝis 1961. Lian artikolon ni reprenis je la afabla permeso de la gazeto *Geographical Magazine* kaj ni ilustris per fotoj i.a. el la biblioteko de la organizo de la verkinto.

La artikolon pri Edison ni reprenis el la bulgara junulara revuo *Kosmo*. Ĝin tradukis la iama estrarano de TEJO, **Nikola Nikolov**.

Materialon por Mozaiko ni ĉerpis el diversaj fontoj. Interalie kontribuis materialon **Lidia Lange**, **Walerian Włodarczyk** kaj **Nikola Nikolov**.

**Roman Dobrzynski** estas iama prezidanto de Pola Esperanto-Junularo, kiu lastatempe gajnis sian magistran diplomon ĉe la Universitato de Varsovio pro tezo pri la Esperanto-gazetaro.

Materialon pri la Mond-Foiro ni ricevis de la gazetara servo de la Foiro.

### KONGLOMERATO

— Kiel oni aŭdas en Ateno, Eŭtifrono mia, vi ne trovas Esperanton lerninda.  
— Vi prave aŭdas, Majstro Sokrato: ne sole mi, sed ankaŭ aliaj la samon ripetas. Esperanto estas ridindaĵo, lingva miksaĵo, konglomerato...  
— Konglomerato? Mi ne sufiĉe precize komprenis vian penson. Ĉu konglomerato laŭ vi, kara Eŭtifrono, estas ordo aŭ malordo?

— Kompreneble, malordo!  
— Kaj Esperanton vi nomas konglomerato tial, ĉar ĝi estas miksaĵo de diverslingvaj elementoj?

— Jes, kara Majstro, vi trafte tion difinis, briligas min via saĝo.

— Nu, vi ĝenas min, mi ne meritas tiun ĉi honoron. Revenante al la temo: ĉu laŭ vi Esperanto estas ankaŭ malordo?

— Nu, ŝajne jes.

— Mi vidas vin heziti. Eble mi ripetu, pri kio temas: Esperanto, kiel konglomerato de elementoj prenitaj el diversaj lingvoj, formas lingvan malordon, kvazaŭ ni parolus unu vorton greke kaj la alian perse. Ĉu mi bone vin komprenis?

— Jes, Majstro, ĝuste mi tutsame opinias. Esperanto estas sama malordo, kiel tiu greko-persa miksaĵo.

— Ĉu malordon eblas kompreni?

— Ho, tute ne!

— Vi havas belajn sklavojn: ŝajne ili estas persoj.

— Vi pravas, nuntempe preskaŭ ĉiuj sklavoj estas persoj. Sed mi ne vendos ilin.

— Ne, ne, Eŭtifrono mia, mi ne volas aĉeti la sklavojn. Diru afable ĉu ili parolas greke?

— Kompreneble, bonege!

— Do, bonvolu al mi respondi, ĉu ili komprenus, se ni parolus alterne unu vorton greke kaj la alian perse?

— ? ? ?

— Probable vi konsentas, ke tiun greko-persan miksaĵon eblas kompreni, do ĝi ne estas malordo. Ĉu ne?

— Vi pravas, Majstro.

— Do, ankaŭ Esperanto ne estas malordo?

— Nu, jes.

— Se mi bone memoras vi diris, ke konglomerato estas malordo. Se Esperanto ne estas malordo, ĝi ankaŭ ne estas konglomerato. Ĉu jes?

— Jes, Esperanto ne estas konglomerato.

— Kaj mia opinie, kara Eŭtifrono, vi

pravus dirante, ke Esperanto estas konglomerato.

— ?!

— Vidu, se iu parolus greko-persan miksaĵon, ni lin ne komprenus, sed viaj sklavoj konantaj ambaŭ lingvojn povus kun li interkompreniĝi. Ĉiu lingvo estas malorda konglomerato por homo, kiu ĝin ne konas. Ellernu Esperanton kaj tiam ĝi ne plu estos por vi konglomerato.

— Kial mi lernu Esperanton, ja ekzistas tradukmaŝinoj!

— Ni povus diskuti pri utileco de tradukmaŝinoj en certaj cirkonstancoj. Nun respondu nur al mi, kiam vi havos maŝinon utiligeblan en la tuta mondo? Verŝajne vi pli frue ellernus Esperanton.

— Eble, sed Esperanto estas naivaĵo.

— Se tiun ĉi "naivaĵon" ne hontas favori profesoro Lapenna, mi ankaŭ ne sentas hontemon esti tiuspeca naivulo.

— Tamen Esperanto estas artefarita!

— Kaj la tradukmaŝinoj, kiujn vi fetiĉas, ne estas artefaritaj?!

— Jes, la tradukmaŝinoj estas artefaritaj, sed Esperanto estas... estas konglomerato!

La bastono de Sokrato rompiĝis. Ankaŭ tiun ĉi argumenton sukcese rezistis la Eŭtifrona kapo.

### Milito

Mi revas pri milito,  
Sen sango kaj sen tomboj,  
Dum kiu niajn urbojn  
Bombardus la seksbomboj.

### Hontemulino

Eĉ sian hontemon  
Ŝi sciis bonuzi:  
Kiam li ŝin petis,  
Ŝi hontis rifuzi.

## **Paŝo en la estontecon :**

Akurate la 22-an de aprilo pasintan, sub la griza ĉielo de ne tre kunlaborema novjorka printempo, la usona Prezidento faris la malferman ceremonion de la plej granda kaj ĉionenhava prezento de homaj atingoj iam ajn kunigita en unu lokon. Temas pri la Novjorka Mond-Foiro de 1964-5, kiun dum kvinjara periodo antaŭ la malfermo oni jam planis.

Lokite en la parkego "Flushing Meadow", apud la urbo de Novjorko, en tiu sama areo kie okazis la Mond-Foiro de 1939-40, la Foiro daŭras dum du someraj sezonoj, de aprilo ĝis oktobro, en la du jaroj 1964 kaj 1965. Dum ĉi tiuj sesmonataj periodoj ĝi estas malferma ĉiutage, por la eduko kaj distro de la milionoj da vizitantoj kiuj daŭre trapasas ĝiajn enirejojn. Oni antaŭvidas ke kiam la Foiro fermiĝos jam estos entute 70 milionoj biletoj venditaj al vizitantoj.

La ĉefa temo de la Foiro estas "Paco per Kompreniĝo", kaj en ĝian terenon kuniĝis ekspozicioj de kvindeko da landoj en ĉiuj mondpartoj. La celo de ĉi tiu Olimpiko de Progreso, malferma al ĉiuj, sendepende de ideologioj, estas la antaŭenigo de komuna kaj daŭra interrespekto inter la nacioj, kaj de kunlaborado kaj monda paco.

Akson de la Foiro formas la Unisfero, simbolo de la tuta ekspozicio. Ĉirkaŭ ĝi grupiĝis la kvin ĉefaj partoj de la Foiro kun ties imponaj pavilonoj kaj ekspoziciaĵoj, amuzejoj, restoracioj kaj tiel plu. En la transporta kaj industria sekcioj troviĝas ekspozicioj de privataj kaj sendependaj kompanioj; en la internacia sekcio estas la pavilonoj de aliaj landoj kiuj kaptis la okazon de la Foiro por prezenti al la mondo la proprajn atingojn, sociajn sistemojn kaj vivmanierojn; iom similan rolon, sed je enlanda nivelo, havas la sekcio de la individuaj usonaj ŝtatoj kaj de la usona federacia registaro; krome, en la suda parto de la foira tereno estas granda amuzejo, kies allogaĵoj inkluzivas provsekcion de unurela fervojo, teatron, cirkon, kaj akvofontanajn prezen-  
tojn.

Super ĉio, kiel simbolo de la interdependo de ĉiuj popoloj sur ŝrumpanta planedo en vastiĝanta universo, staras la giganta Unisfero, el rustrezista ŝtalo, kiun prezentis al la Foiro la usona entrepreno United States Steel. Kontinentojn sur la 13 etaĝojn alta globo oni subtenis per kradsimila kadro de latitudoj kaj longitudoj. Lerta lumigo ŝajnis la movadon de la tero. Tri orbitaj cirkloj kroĉitaj de la strukturo per preskaŭ nevideblaj ŝtalaj dratoj omaĝas la unuajn provojn de la homaro veturi en spacon.

Monorail: La unurela fervojo en la Amuza Sekcio de la Foiro funkcias tute aŭtomate. Estas ses duvagonaj trajnoj 30 metrojn longaj, kiuj portas po 80 pasaĝerojn.

Ili vojaĝas en ambaŭ direktoj sub trakoj I-trabaj, kiuj longas entute iom pli ol unu kilometron.

En ĉiu trajno oni ludas dum la vojaĝo sonbendigitan priskribon de la ĉefaj vidindaĵoj kiujn oni preterpasas.


La japana pavilono estas adaptata de japana feŭda kastelo. La skulptitaj muroj, de la skulptisto Nagare, entenas senfenestran kaj senkolonan spacon kies tegmenton subtenas centra ŝtala stango 25 metrojn alta.

Diversaj plankniveloj estas atingeblaj per deklivaĵoj el centra korto ĉe la plej malalta parto de la pavilono.


La plej alta nivelo kondukas al la aparta ekspozicia sekcio, kiu estas ŝtalkadra konstruaĵo kaj kiu entenas interalie tradician japanan ĝardenkorton.




# la Novjorka Mond-Foiro




© 1963 NEW YORK WORLD'S FAIR 1964-1965 CORPORATION



© 1963 NEW YORK WORLD'S FAIR 1964-1965 CORPORATION



© 1963 NEW YORK WORLD'S FAIR 1964-1965 CORPORATION



© 1963 NEW YORK WORLD'S FAIR 1964-1965 CORPORATION

Multaj formoj de arkitektura esprimado reprezentigas ĉe la Foiro, kaj ĝiaj pli ol 150 individuaj pavilonoj montras grandan diversecon de konstrumanieroj. En multaj okazoj, la Foiro servas kiel provloko por novaj strukturaj konceptoj kaj utiligo de materialoj. La fakto ke temas pri portempaj konstruaĵoj, kune kun la forta konkurenco, kuraĝigis eksperimentadon, individuecon kaj aŭdacon — eble kelkfoje troajn.

La plej interesa parto de la Foiro por internaciema vizitanto estas kompreneble la internacia sekcio, kie 50 nacioj ekspozicias en areo dediĉita al mondkadraj intereso, industrio kaj metiado, kulturo kaj belarto, ĉu en ŝtataj ekspozicioj, ĉu sub entreprenaj aŭspicioj. Ĝi ne estas ia aro da vendotaĵoj, sed viva prezento de la landoj kaj popoloj — iliaj historio, nunaj realecoj, fido je la estonteco. Speciale la pavilonoj de la novaj landoj de Afriko kaj la ekspozicioj el Azio simboligas la progreson de demokratio kaj materia bonfarto dum la periodo de post la Foiro de 1939-40.

En la internacia sekcio oni povas vidi, kvazaŭ surloke, la antikvajn procedojn de afrikaj metiistoj, spekti en la gvinea pavilono la famajn gvineajn dancojn, manĝi la tradiciajn kimĉi kaj bulgoki ĉe la korea restoracio, rigardi perloplongistojn el Polinezio, aŭ simple trinki veran belgan bieron en la ombroj de la vasta bierkelo de Belgio.

Ofte per la konstruado mem de la pavilonoj oni emfazis la naturajn aŭ kulturajn kvalitojn de la diversaj landoj. La pavilono de Aŭstrio, ekzemple, estas konstruita el lingno por simboligi la riĉecon de la aŭstria ligna industrio; tiu de Indonezio estas parte el valoraj materialoj el Indonezio mem — ekzotika ligno kaj marmoro; la arkitekturajn stilojn de Kajro oni emfazis en la desegno de la pavilono de la U.A.R.; tiun de Libano oni konstruis el libana ŝtono; kaj la muroj mem de la japana pavilono konsistigas grandegan skulptaĵon — unu el la artisme plej sukcesaj vidindaĵoj el la tuta internacia sekcio.

Sed senfine oni povus paroli pri ĉi tiu kvazaŭ mikrokosmo de la atingoj — kaj mankoj — de la dudeka jarcento. Venante al Flushing Meadow, vi vidos ne nur la fieraĵojn de la hodiaŭo, sed vi ekpaŝos unu paŝon en la estonteco. Kaj la brilojn de tiu estonteco ni ja atingos — se la devizo de la Foiro "paco per kompreniĝo" regos en la morgaŭa mondo.

La sveda pavilono havas kiel temon "Kreema Svedujo". Oni tie elmontras ekspoziciojn de industria kaj sciencexplora progreso en Svedujo, metifabrikaĵojn kaj popolan arton.

La fama sveda Smorgasbord estas la ĉefa notindaĵo de la restoracio.

La danan pavilonon oni konstruis el naturaj pinaj kolonoj, kun altaj kaj vastaj fenestroj.

Interne troviĝas specimenoj de danaj produktaĵoj, kiel ekzemple peltoj, teksaĵoj, porcelano, arĝentaĵoj, ceramikaĵoj ktp.

Interalie la pavilono enhavas infangardenon por la servo de vizitantoj, kaj restoracion.

En la pavilono de la kompanio Parker Pen troviĝas granda elektrona komputilo kiu el unu miliono da adresoj elektos por vi korespondantojn laŭ lingvo, aĝo, intereso kaj loko. Kompreneble, la elekto inkluzivas korespondantojn en Esperanto. Eĉ se vi ne persone vizitos la Foiro, vi povas utiligi la servon. Petu aliĝilon ĉe: Parker Pen Company, Penfriend Program, Janesville, Wisconsin, Usono.

## Artaj ekspozicioj proponas varion kaj belon ĉe la foiro

La artkolektoj ĉe la Foiro varias inter pretervaloraj antikvaĵoj ĝis abstraktaj nereprezentaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj. Eĉ se la aŭdacaj kaj variaj arkitekturaj stiloj de la pavilonoj mem tamen lasas ĉe la spektanto ĉefe impreson de efemereco, la ekspozicioj de artaĵoj kiujn ili ofte enhavas estas kvazaŭ memorigo pri pli eternaj valoroj. Ĉe la cirkla subaĵo de la Federacia Pavilono troviĝas subĉiela ekspozicio elektita fare de la Muzeo de Moderna Arto en Novjorko, kaj ankaŭ ĉe la ŝtata pavilono de New Jersey estas impona subĉiela ekspozicio de skulptaĵoj. Kvankam ofte ĉe la ŝtataj prezentoj mankas la subtileco kiun oni trovas en la industriaĵoj kaj internaciaj pavilonoj (ekzemple, en la pavilono de Illinois estas mekanika Abraham Lincoln, kiu ridetas, sulkas la brovon kaj recitas paroladojn, post kio ekkantatas io tre simila al ĉiela koruso), tamen en la prezentoj de Montano, Teksaso kaj la Novangluĵaj Ŝtatoj oni speciale emfazas la artajn atingojn de tiuj ŝtatoj, kaj la pavilono de Novjorkŝtato havas tre imponan kolekton de artaĵoj, ĉefe skulptaĵoj el la Metropol Muzeo en Novjorkkurbo, valoraj el la Muzeo de Primitiva Arto kaj impone riĉa prezento kunmetita de la avangarda Muzeo Guggenheim. Komitato de eminentaj muzeaj direktistoj kaj kuratoroj prizorgis la elekton de 40 pentraĵoj por ilustrati "Kvar Jarcentojn de Amerikaj Majstroverkoj" en la t.n. "Centro de Plibona Vivado". Aparte enhavoriĉaj estas kompreneble la internaciaj prezentoj. La pavilono de la Unuiĝinta Araba Respubliko, ekzemple, ekspozicias la plej riĉan kolekton da egipta arto kiun oni iam ajn prezentis en eksterlando. Kaj el Tajvano venis bronzaĵoj, porcelano, jadaĵoj, antikvaj skribaĵoj kaj ŝtonaj monstroj el Ŝangera, kiuj reprezentas kvardek jarcentojn de orienta arto. Enirante la grandan pavilonon de

Hispanujo oni trovas sin meze de kolekto de majstroverkoj el la muzeo Prado, en Madrid — kolekto kies riĉeco mem forigas la spiron: verkoj de El Greco, Goya, Velasquez, Zurbaran. Kaj apud ĝi troviĝas ankaŭ ekspozicio de modernaj hispanaj pentristoj — Dali, Picasso kaj Miró interalie. En la t.n. Amerika Israela pavilono turniĝanta ekspozicio montras verkojn de Rembrandt, Lieberman, Chagall kaj aliaj kiuj interpretis la judan vivmanieron en siaj pentraĵoj. Murpentraĵoj de Diego Rivera formas centran parton de la meksikia elmontro, kaj en la venezuela pavilono estas ekspoziciataj verkoj de la artistoj Jesus Soto kaj Armondo Reveron. En la Afrika Pavilono estas granda prezento de primitiva arto; en tiu de Belgio troviĝas koloraj sablaj portretoj; ĉe Hindio estas antikvaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj; kaj en la filipina pavilono skulptitaj lignopaneloj rakontas la historion de la Insuloj. Bertoni artistis la 16 metrojn altan abstraktaĵon el rustrezista ŝtalo kiun oni lokis antaŭ la aŭstria pavilono, kaj la greka prezento ankaŭ enhavas metalajn skulptaĵojn — de Capralos — kaj ŝtonajn kaj marmorajn de Lameraras. La religiaj pavilonoj uzas artverkojn kiel integran parton de la prezentoj. La antikva, gemkovrita Sankta Ikono de la Virgino de Kazan estas ekspoziciata de la Rusortodoksa-Grekkatolika Eklezio, kaj la Protestantan kaj Ortodoksan Centron oni ornamis per moderndesegnaj kolorvitraj fenestroj. Kaj en la Vatikana pavilono troviĝas la plej rimarkinda ekspoziciaĵo el la tuta Foiro — la *Pietà* de Michelangelo — skulptaĵo kiu la unuan fojon ekspoziciigas for de la Vatikano. La sola risko estas ke ĉi tie, inter tiom da majstroverkoj, ni ne sukcesos ĉion aprezi. Sed tiu risko en si mem atestas pri la riĉeco de la tuto.

### PAROLANTE STATISTIKE

#### Faktoj pri la Novjorka Mondfoiro

□ Kiel diras unu priskribo de la Foiro, "Ĝi nomiĝas la unua miliarda foiro." Ĉi tiu sumo inkluzivas \$ 125 milionojn por novaj alirvojoj, \$ 120 milionojn por la tute nova ponto ĉe Throgs Neck, kaj \$ 19 milionojn por nova stadiono. Ĉio ĉi havos daŭran valoron post la Foiro mem — sed eĉ ne kalkulante tiajn flankelspezojn, la portempa Foira komplekso kaj ĝia organizado kostos \$ 550 milionojn (kompare kun \$ 155 milionoj de la Foiro de 1939-40).

□ Post la grandaj ciferoj venas la detalaj... Preskaŭ 9000 konstruistoj dungigis por fabriki 200 konstruaĵojn, pavilonojn ktp. Oni lokis kaj kunvinktis 250.000 tunojn da ŝtalo.

□ La 24 kilometrojn da foiraj stratoj lumigas 1.842 lampstangoj. Oni bezonis du jarojn por instalati 540 kilometrojn da elektra kablo, 24 kilometrojn da ĉefaj akvotuboj, 16 kilometrojn da gastuboj, 48 kilometrojn da telefonkabloj kaj 35 kilometrojn da kloaktuboj. Ĉio ĉi sufiĉas por urbejo de ĉirkaŭ 200.000 enloĝantoj.

□ Estas kvin oficialaj lingvoj ĉe la Foiro — la angla, hispana, franca, itala kaj germana.

□ Kiam ili lacas, la 70 milionoj da vizitantoj disponas 3.500 benkojn por ripozi, kaj 2.500 pakajŝranketojn por siaj posedaĵoj. Se ili volas manĝi, ili povas elekti inter 30.552 seĝoj en 113 restoracioj kaj lunĉejoj. Se ili deziras telefoni, estas 10.000 telefonoj en la foira tereno.

□ La Foiro estas la naŭa usona mondfoiro de la nuna jarcento — sed ne la plej granda: tiu de Saint Louis en 1901, ekzemple, havis 1.500 konstruaĵojn kaj 72 kilometrojn da vojoj — kaj tiu de San Diego en 1916 estis eĉ pli granda. Tuja antaŭulo de la nuna Foiro en Novjorko estis la Ekspozicio "Jarcento 21" en Seattle en 1962.


Okaze de la Monda Foiro, la Buroo por Kongresoj kaj Vizitantoj de Novjorko eldonis broŝuron en Esperanto kun detaloj pri vidindaĵoj de la urbo kaj granda kolora mapo. Por ricevi ĝin kaj por havigi aliajn informojn pri la urbo kaj la Foiro skribu al: New York Convention and Visitors Bureau, 90 East 42nd Street, New York 17, N.Y., Usono.

**INTERNACIAJ  
EKSPOZICIAŬOJ ĈE LA  
MOND-FOIRO**

Afrika Pavilono  
Aŭstrio  
Belgio  
Centra Ameriko (Panamo  
Kostariko, El Salvador,  
Gvatemalo, Honduraso,  
Nikaragvo)  
Ĉinio (Tajvano)  
Danlando  
Filipinio  
Francio  
Greklando  
Gvineo  
Hindio  
Hispanio  
Hongkongo  
Internacia Placo (Belgio, Birmo,  
Brazilo, Ekvadoro, Germana  
F.R., Hindio, Italio, Jugoslavio,  
Luksemburgo, Monako, Taj-  
vano, Tunizio)  
Indonezio  
Irlando  
Israelo  
Japanio  
Jordanio  
Libano  
Malajzio  
Maroko  
Meksikio  
Pakistano  
Polinezio  
Sieraleono  
Suda Koreo  
Sudano  
Svedio  
Svislando  
Tajlando  
Turkio  
U.A.R.  
Vatikano  
Venezuelo


La pavilono de Libano prezentas la  
arton de tradicia libana arkitekturo  
en modernigita formo.

La konstruaĵo estas farita tute el  
libana ŝtono. En la pavilono estas  
ekspozicio pri la kulturo kaj turismaj  
allogaĵoj de Libano, kaj  
restoracio kie oni surtabligas tradiciajn  
libanajn manĝojn.



© 1963 NEW YORK WORLD'S FAIR 1964-1965 CORPORATION

La pavilono de la Federacia Registaro  
de Usono. Sub ĝi troviĝas granda  
artekspozicia tereno, kun artaĵoj  
elektitaj fare de la Muzeo de Moderna  
Arto en Novjorko.



© 1963 NEW YORK WORLD'S FAIR 1964-1965 CORPORATION

Je aprilo 1564

William Shakespeare naskiĝis

## Otelo

tradukis Reto Rossetti  
majstroverko de la Esperanta tradukarto

*Otelo* estas unu el la kvar grandaj tragedioj de Shakespeare: legante ĝin oni sentas ne nur la aŭtentikan "senton" de la ora epoko de angla literaturo, kaj la intrigoplenan mondon de renesanca nobela vivo, sed ankaŭ la kontakton kun unu el la plej brilaj mensoj en la tuta historio de la homaro, kaj la plej miriga poezio kiu retenis ĉiun sian imponon tradukite en la Internacian Lingvon.

Prezo: 26,80 steloj, 6,70 ned. guld.

## Angla Antologio 1000-1800

redaktis William Auld kaj Reto Rossetti  
enkonduko de Marjorie Boulton

Ci tiu plej taŭga enkonduko al la literaturo kies majstro estis Shakespeare inkluzivas tradukojn de kvar sonetoj de Shakespeare mem kaj tutajn aktojn el la bonkonata *Julio Cezaro* kaj la eterne populara *Romeo kaj Julieta* — kune kun amasaj brilaj tradukoj el samtempanoj de Shakespeare.

Bindita. Prezo: 40 steloj, 10 ned. guld.

Mendu de:

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO - NIEUWE BINNENWEG 176, - ROTTERDAM-2, - NEDERLANDO**

# Vamen

**ORGANO DE POLA ESPERANTO-JUNULARO  
KAJ UNUIĜO DE POLAJ STUDENTOJ**

jarabono:

36,00 zlotoj por Pollando

1,10 US dolaroj (16 steloj) por eksterlando

**junulara gazeto tute en esperanto,  
kun internacia legantaro**

Abonu ĉe:

Eksporta kaj Importa Entrepreno "Ruch",  
Warszawa, str. Wilcza 46, Pollando (Narodowy  
Bank Polski XII OM — konto 1534-6-71) kaj ties  
perantoj tra la mondo;

aŭ eĉ:

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg  
176, Rotterdam-2, Nederlando (ĝirkonto 378964)  
kaj ties landaj perantoj.

**POLA ESPERANTO-JUNULARO - WROCLAW - STR. DUBOIS 3 - POLLANDO**

### ESTRARO DE T.E.J.O.

**Günther Becker**, prezidanto, Schlossbergstr. 51, 6653 Blieskastel, Saar, Germanio.  
**Carlo Minnaja**, ĝenerala sekretario, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio.  
**Simeon Simeonov**, vice-prezidanto, G. Genov 22, Sofia-C, Bulgario.  
**Humphrey Tonkin**, redaktoro de Kontakto kaj kasisto, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono.  
**Marek Pietrzak**, estrarano pri planado kaj eksteraj kontaktoj, Dworcowa 1, Kluczbork, Pollando.  
**Ivo Osibov**, red. de La Juna Vivo, Splitskog Odreda 15, Split, Jugoslavio.  
**Svobodan Zlatnar**, estrarano pri kulturaj kaj lernejoj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio.

### LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

**AŬSTRALIO:**  
Daniel Kane, 5/55 Hardwich Street, North Melbourne  
**AŬSTRIO:**  
Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, Graz  
**BELGIO:**  
Van Humbeeck, Ridder Dessainlaan 3, Mechelen  
**BRITIO:**  
13 Oak Lane, Beccles, Suffolk  
**BULGARIO:**  
pk. 587, Sofia  
**FRANCIO:**  
34 rue Vauvenargues, Marseille 7  
**GERMANIO:**  
Am Festungsgraben 53, 23 Oldenburg  
**HISPANIO:**  
Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona  
**HUNGARIO:**  
HEA, Petöfi Sándor u. 17, Budapest 5  
**ITALIO:**  
Gaspere Bracchi, Via Caimi 54, Sondrio  
**JAPANIO:**  
1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio

**JUGOSLAVIO:**  
Terazije 42, Beograd  
**KOREO:**  
Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul  
**MADAGASKARO:**  
B.P. 1678, Tananarive  
**NEDERLANDO:**  
Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.  
**NORDAMERIKO:**  
Ann Bodine, 331 Sage Hall, Cornell University, Ithaca, N.Y., 14850  
**POLLANDO:**  
Dubois 3, Wrocław  
**SVEDIO:**  
Lars Olsson, Lilla Fiskaregatan 3, Lund  
**SVISLANDO:**  
pk. 33, Lyss/BE

### LERNEJAJ ABONOJ DE "KONTAKTO"

"Kontakto" estas kutime abonebla kontraŭ 8 guldenoj jare, sed TEJO pretas disponigi la gazeton al lernejoj kontraŭ jarkotizo de nur 2,50 guldenoj (10 steloj). Tion TEJO faras simple por helpi en la livero de taŭga legmaterialo al lernejoj kiuj lernas Esperanton. "Kontakto" taŭgas por la pli aĝaj lernantoj (14-jaraj kaj pli) kaj por, ekzemple, anoj de instruistaj seminarioj. Tiaj abonantoj devas esti lernantoj de Esperanto en oficiala kurso de iu lernejo. Oni devas samtempe pagi minimume 10 abonojn kaj sendi al la administracio de "Kontakto" atestilon sur oficiala skribpapiro de la koncerna lernejo, kun informo ke ili estas destinitaj al oficiala Esperanto-klaso en tiu lernejo, kaj kun subskribo de la koncerna respondeca persono. Ni ne povas disponigi ekzemplerojn je ĉi tiu favora prezo af neoficialaj kursoj aŭ nelernejaj klasoj. Ĉiuj ekzempleroj por unu lernejo estos kune ekspeditaj en unu pakajo. Individuajn numerojn ni povas liveri laŭ samaj kondiĉoj kontraŭ prezo de 3 steloj (0,75 ned. gld.) por unu ekzemplero. Administracio: "Kontakto", UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

### ABONU AL

# KIAL NE ?

### BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA BRITA

Interesa kaj provoka enhavo Abundaj fotoj kaj desegnoj Facile kaj senstreĉe legebla  
Abono: 6ŝ aŭ 12 rpk. jare  
Abonebla ĉe UEA: 3,70 gld.  
Perantoj en dekdu landoj

Petu senpagan specimenan ekzempleron aŭ abonu ĉe la  
Redaktoro: S-ro Jonathan Hamilton -  
16, Woodleys, Harlow, Essex, Anglujo  
Dumonata; tutmonde legata

# MOZAIKO

Ni vivas en la kadro de tempo. Tiel ĉienira estas tiu elemento de nia konscio, ke ni devas kvazaŭ stari ekster ĝi dummomente por konstati kiel komplete ĝi regas niajn vivojn. Ĉar ni pensas kaj agas ĉiame, ni mortuloj kiuj rigardas antaŭen kaj malantaŭen, en rilato al horoj kaj tagoj kaj semajnoj kaj monatoj kaj jaroj. Hieraŭ kaj morgaŭ, la venontan semajnon, unu monaton de nun, antaŭ unu jaro, post dudek minutoj — jen la terminoj per kiuj, konscie aŭ aŭtomate, ni agas kaj planas kaj pensas. Kaj por orientiĝi je certa momento en la flua kontinueco, ni portas horloĝojn ĉe la manoj, kaj metas horloĝojn en niaj domojn kaj sur turojn, kaj ie apud ni ni havas ĉiam kalendaron, kaj ni rigardas horarojn kiam ni volas vojaĝi... (John Livingston Lowes)

*La Redaktoro bonvenigas materialon de legantoj por ĉi tiu rubriko.*

*Profesoro: Kio estas la plej valora produktaĵo, kiun donis la kemio al la homaro?*

*Studento: La blondulinoj.*

La plej fora objekto videbla sen optika helpilo estas la Granda Spiralo en Andromeda, ekstera stelsistemo kiun oni povas vidi kiel nebulaĵon proksiman al la Kvadrato de Pegasus. La Granda Spiralo, kies astronomia nomo estas M 31 (la 31-a objekto en fama katalogo kompilita de la 18-jarcenta franca observanto Charles Messier), estas preskaŭ 2.000.000 lumojarojn for de ni.

Mezurante stelajn distancojn, ni trovas ke la mejlo estas tro mallonga unuo por esti konvena. Feliĉe, pli bona unuo estas uzbla. Lumo moviĝas je 186.000 mejloj sekunde, kaj la distanco kiun ĝi trairas en unu jaro, 5.880.000.000.000 aŭ preskaŭ ses milionoj da milionoj da mejloj, nomiĝas la lumojaro. Estas evidente, do, ke la Granda Spiralo estas preskaŭ nekonceptebla fora, kvankam ĝi estas unu el la plej proksimaj eksteraj galaksioj. Kiam oni rigardas la Spiralon, oni rigardas ne nur tra la spaco, sed ankaŭ malantaŭen tra la tempo. Oni vidas la sistemon ne tia kia ĝi estas, sed tia kia ĝi estis antaŭ 2.000.000 jaroj, antaŭ la komenco de la lasta Glacia Epoko kaj longe antaŭ la ekesto de la homaro. De post tiu epoko la lumoj kiu nun eniras niajn okulojn vojaĝis tra la spaco al ni.

*(The Listener, London)*

*Robert Frost, fama usona poeto, iam difinis poezion kiel "tio kio perdiĝas en la traduko."*

Kiam krepuskiĝas, mi revenas hejmen kaj eniras mian bibliotekon. Forprenante ĉe ĝia sojlo miajn kamparajn vestojn, makulitajn de koto, mi surmetas sinjorajn vestaĵojn, kaj tiel taŭge ornamite, mi eniras per miaj libroj la antikvajn kortegojn de antikvuloj, per kiuj, post plej afabla bonvenigo, mi ricevas nutraĵojn kiu apartenas sole al mi, kaj por kiu mi naskiĝis; kaj mi ne hontas konversacii kun ili, kaj demandi pri la motivoj de iliaj agoj; kaj ĉi tiuj homoj homece respondas al mi, kaj dum periodo de kvaroj da horoj mi sentas neniun lacon, memoras neniun malfeliĉon, ne plu timas malriĉecon, nek timiĝas pro morto; ili posedas mian tutan memon. (Niccolò Machiavelli 1469-1527)

*Ĉu vi scias kiuj estas la veraj nomoj de la jenaj famuloj?*

1. Sarah Bernhardt (1844-1923) — franca aktorino.
2. Le Corbusier (1887- ) — Francsvisa arkitekto
3. Joseph Conrad (1857-1924) — angla verkisto poldevena.
4. Anatole France (1844-1924) — verkisto.
5. Greta Garbo (1906- ) — sveda filmaktorino.
6. Maksim Gorki (1868-1936) — rusa verkisto.
7. Vladimir Lenin (1870-1924) — gvidanto de la revolucia movado en Sovetunio.
8. Molière (1622-1673) — franca komedia verkisto.
9. Pablo Picasso (1881- ) — franca pentristo.
10. Boleslaw Prus (1845-1912) — eminenta pola verkisto.
11. George Sand (1804-1876) — franca verkistino.
12. Konstanti Stanislavski (1863-1938) — rusa aktoro kaj pedagogo.
13. Stendhal (1783-1842) — franca romanverkisto.
14. Tito (1892- ) — prezidento de Jugoslavio.
15. Voltaire (1694-1778) — franca filozofo kaj verkisto.

*(Respondoj troviĝas ie en ĉi tiu numero)*





La juna direktoro forprenis cent mil dolarojn el la sekurejo de la kompanio kaj ĝin tute perdis je fuŝa investo ĉe la borso; certe oni eltrovus la ŝtelon. Krome, lia bela edzino ĵus forlasis lin. Li iris al la rivero, kaj precize tiam kiam li pretiĝis por sin ĵeti en la akvon, li sentis sulkan manon sur sia ŝultro. Li turniĝis kaj vidis antikvan inon en nigra kapoto, kun kaduka vizaĝo kaj malpuraĉa griza hararo.

"Ne saltu," ŝi diris grince. "Mi estas sorĉistino, kaj mi permesos al vi tri viajn dezirojn, kontraŭ la kutima maklero." "Mi estas preter via helpokapablo," li respondis, kaj klarigis al ŝi siajn problemojn.

"Facila afero," ŝi diris ridaĉe. "Abrakadabra! La mono estas denove en la kompania sekurejo. Abrakadabra! Via edzino atendas vin hejme kun amo en la koro. Abrakadabra! Vi nun havas ducent mil dolarojn en persona konto ĉe la banko!"

La homo, silentigite pro miro, fine sukcesis demandi: "Kio — kio estas la maklero kiun mi ŝuldas al vi?"

"Vi devas pasigi la nokton amorante kun mi," ŝi ridetis sendentan rideton. La ideo de amindumo al tiu aĝa virinaĉo preskaŭ naŭzigis lin, sed certe valoris la investo, laŭ li. Kune ili iris al apuda hotelo, kaj, la postan matenon, je la konkludo de la malagrabla interkonsento, kiam li pretigis sin por hejmeniri, la sulkulino en la lito demandis: "He, knabeto, kiom aĝa vi estas?"

"Mi havas kvardek du jarojn," li respondis. "Kial vi demandas?" "Ĉu vi ne estas iom tro aĝa por kredi ke ekzistas sorĉistinoj?"

*Freĉjo iris kun sia patro al la kamparo, por pasigi tie sian ferion. "Kial la koko ĉiam krias, paĉjo?"*

*"La koko, mia knabo, ĉiam krias, kiam homo diras mensogon."*

*"Sed kial krias je la tria en la nokto?"*

*"Ĉar oni tiam presadas la matenjurnalon, Freĉjo."*

*Ekzistas svisa spritaĵo, kiu bone karakterizas tiun nacion pro diversaj kialoj. Juna soldato, kiu partoprenis iun militan ekzercon, estis trafita de bajoneto kiu fiksas lin al arbo, tiel ke dum kvin horoj li ne povis sin liberigi. Finfine trovis lin kamarado, kiu*

## KELKAJ VORTOJ DE LA REDAKTORO

Fasis nun sufiĉa tempo por iome ekscii la opiniojn kaj dezirojn de nia legantaro. Kiel ĉiam, ĉe iu ajn legantaro, opinioj pri la enhavo kaj ideala enhavo de Kontakto estas ege diversaj. Sed ĝenerale la ideoj kaj komentoj kiuj abunde enfluis la redakcion proponis du ĉefajn celojn atingindajn: variigon de la enhavo kaj forigon de "esperantismo".

Ambaŭ ĉi tiuj celoj, kiujn la redakcio mem absolute subtenas, estas atingeblaj nur se envenas la redakcion abunda materialo. Mi esperas ke mi ne estas tia redaktoro kiu ĉiam kulpigas la legantaron pro la mankoj en la gazeto, sed tute kompreneble, eĉ se mi daŭre serĉas materialon, mi ne povas legi taŭgajn gazetojn en dudek lingvoj por ĉerpi materialon, nek skribi amase leterojn al ĉiu ajn ebla kontribuonto. Necesas ke vi mem iel helpu...

La korespondaĵoj kiuj atingas min montras ke jam ekzistas granda intereso pri nia gazeto inter la ĵunaj geesperantistoj. Tiajn korespondaĵojn mi atente legas, memoras viajn proponojn kaj klopodas utiligi viajn ideojn. Per tiaj komentoj kaj kritikoj ni sukcesis fari la progreson kiun ni faris!

Sed variigita materialo, tradukita el aliaj lingvoj ol la angla, aŭ pritraktanta kulturojn neeŭropajn, daŭre mankas al mi kiel redaktoro. Mankas ankaŭ fotoj kaj bildoj. Plej grave, mankas elekto de materialo: preskaŭ ĉion kion mi ricevas mi devas aperigi.

Per la enigo de la rubriko Mozaiko ni fine forigis tiun kutiman argumenton "Mi ne kapablas ion verki". Nun ekzistas ebleco aperigi la plej malgrandajn erojn, kiujn ĉiu nia leganto povus liveri al ni. Do, ni atendas reagon!

Sed tute ne ĉesu la kritikado kaj komentado pri la gazeto, kiu nun venas al la redakcio. Male: ĝi ankoraŭ kresku! Kresku ankaŭ la praktika helpo kiun vi mem povas doni: varbado, havigo de pagaj reklamoj, informado.

Mi ne danku al vi pro helpo jam donita al via propra gazeto. Tio ne decus. Mi simple memorigu vin ke la progreson nun faritan faris niaj komunaj fortoj. Komune ni povas ankoraŭ progresi.

Humphrey Tonkin

*demandis komplete: "Ĉu ĝi doloras?"*  
*La homo respondis: "Nur kiam mi ridas."*

(George Mikes)

## ĈU VI SCIAS ?

(respondoj al la demandoj)

1. Rosine Bernard, 2. Charles Édouard

Jeanneret, 3. Jozef Teodor Konrad Korzeniowski, 4. Jacques Anatole Thibault, 5. Greta Gustaffson, 6. Aleksiej Maksimov Pjeŝkov, 7. Vladimir Iliĉ Uljanov, 8. Jean-Baptiste Poquelin 9. Pablo de Ruiz, 10. Aleksander Glowacki, 11. Aurore Dudevant (mask. Dupin), 12. Konstanti Aleksejev, 13. Henri Beyle, 14. Josip Broz, 15. François-Marie Arouet.

La juna direktoro forprenis cent mil dolarojn el la sekurejo de la kompanio kaj ĝin tute perdis je fuŝa investo ĉe la borso; certe oni eltrovus la ŝtelon. Krome, lia bela edzino ĵus forlasis lin. Li iris al la rivero, kaj precize tiam kiam li pretiĝis por sin ĵeti en la akvon, li sentis sulkan manon sur sia ŝultro. Li turniĝis kaj vidis antikvan inon en nigra kapoto, kun kaduka vizaĝo kaj malpuraĉa griza hararo.

"Ne saltu," ŝi diris grince. "Mi estas sorĉistino, kaj mi permesos al vi tri viajn dezirojn, kontraŭ la kutima makleroj." "Mi estas preter via helpokapablo," li respondis, kaj klarigis al ŝi siajn problemojn.

"Facila afero," ŝi diris ridaĉe. "Abrakadabra! La mono estas denove en la kompania sekurejo. Abrakadabra! Via edzino atendas vin hejme kun amo en la koro. Abrakadabra! Vi nun havas ducent mil dolarojn en persona konto ĉe la banko!"

La homo, silentigite pro miro, fine sukcesis demandi: "Kio — kio estas la makleroj kiun mi ŝuldas al vi?"

"Vi devas pasigi la nokton amorante kun mi," ŝi ridetis sendentan rideton. La ideo de amindumo al tiu aĝa virinaĉo preskaŭ naŭzigis lin, sed certe valoris la investo, laŭ li. Kune ili iris al apuda hotelo, kaj, la postan matenon, je la konkludo de la malagrabra interkonsento, kiam li pretigis sin por hejmeniri, la sulkulino en la lito demandis: "He, knabeto, kiom aĝa vi estas?"

"Mi havas kvardek du jarojn," li respondis. "Kial vi demandas?" "Ĉu vi ne estas iom tro aĝa por kredi ke ekzistas sorĉistinoj?"

*Freĉjo iris kun sia patro al la kamparo, por pasigi tie sian ferion. "Kial la koko ĉiam krias, paĉjo?"*

*"La koko, mia knabo, ĉiam krias, kiam homo diras mensogon."*

*"Sed kial krias je la tria en la nokto?"*

*"Ĉar oni tiam presadas la matenĵurnalon, Freĉjo."*

*Ekzistas svisa spritaĵo, kiu bone karakterizas tiun nacion pro diversaj kialoj. Juna soldato, kiu partoprenis iun militan ekzercon, estis trafita de bajoneto kiu fiksis lin al arbo, tiel ke dum kvin horoj li ne povis sin liberigi. Finfine trovis lin kamarado, kiu*

## KELKAJ VORTOJ DE LA REDAKTORO

Pasis nun sufiĉa tempo por iome ekscii la opiniojn kaj dezirojn de nia legantaro. Kiel ĉiam, ĉe iu ajn legantaro, opinioj pri la enhavo kaj ideala enhavo de Kontakto estas ege diversaj. Sed ĝenerale la ideoj kaj komentoj kiuj abunde enfluis la redakcion proponis du ĉefajn celojn atingindajn: variigon de la enhavo kaj forigon de "esperantismo".

Ambaŭ ĉi tiuj celoj, kiujn la redakcio mem absolute subtenas, estas atingeblaj nur se envenas la redakcion abunda materialo. Mi esperas ke mi ne estas tia redaktoro kiu ĉiam kulpigas la legantaron pro la mankoj en la gazeto, sed tute kompreneble, eĉ se mi daŭre serĉas materialon, mi ne povas legi taŭgajn gazetojn en dudek lingvoj por ĉerpi materialon, nek skribi amase leterojn al ĉiu ajn ebla kontribuonto. Necesas ke vi mem iel helpu...

La korespondaĵoj kiuj atingas min montras ke jam ekzistas granda intereso pri nia gazeto inter la junaj geesperantistoj. Tiajn korespondaĵojn mi atente legas, memoras viajn proponojn kaj klopodas utiligi viajn ideojn. Per tiaj komentoj kaj kritikoj ni sukcesis fari la progreson kiun ni faris!

Sed variigita materialo, tradukita el aliaj lingvoj ol la angla, aŭ pritraktanta kulturojn neeŭropajn, daŭre mankas al mi kiel redaktoro. Mankas ankaŭ fotoj kaj bildoj. Plej grave, mankas elekto de materialo: preskaŭ ĉion kion mi ricevas mi devas aperigi.

Per la enigo de la rubriko Mozaiko ni fine forigis tiun kutiman argumenton "Mi ne kapablas ion verki". Nun ekzistas ebleco aperigi la plej malgrandajn erojn, kiujn ĉiu nia leganto povus liveri al ni. Do, ni atendas reagon!

Sed tute ne ĉesu la kritikado kaj komento pri la gazeto, kiu nun venas al la redakcio. Male: ĝi ankoraŭ kresku! Kresku ankaŭ la praktika helpo kiun vi mem povas doni: varbado, havigo de pagaj reklamoj, informado.

Mi ne danku al vi pro helpo jam donita al via propra gazeto. Tio ne decus. Mi simple memorigu vin ke la progreson nun faritan faris niaj komunaj fortoj. Komune ni povas ankoraŭ progresi.

Humphrey Tonkin

*demandis komplete: "Ĉu ĝi doloras?"  
La homo respondis: "Nur kiam mi ridas."*

(George Mikes)

## ĈU VI SCIAS ?

(respondoj al la demandoj)

1. Rosine Bernard, 2. Charles Édouard

Jeanneret, 3. Jozef Teodor Konrad Korzeniowski, 4. Jacques Anatole Thibault, 5. Greta Gustafsson, 6. Aleksiej Maksimov Pješkov, 7. Vladimir Iliĉ Uljanov, 8. Jean-Baptiste Poquelin 9. Pablo de Ruiz, 10. Aleksander Glowacki, 11. Aurore Dudevant (nask. Dupin), 12. Konstanti Aleksejev, 13. Henri Beyle, 14. Josip Broz, 15. François-Marie Arouet.

# Thomas Alva Edison

En la bibliotekon de la urbeto Port Gurion timeme eniras pala, malriĉe vestita knabo, kiu salutas ĝentile kaj direktas sian scivoleman rigardon al la unua breto da libroj. Kaj ĝi estas kvin metrojn longa.

"Kiun libron vi deziras?" ĝentile demandas la okulvitra bibliotekisto.

"Tiun ĉi! Mi petas, tiun ĉi!" montras la knabo per fingro la unuan volumon sur la breto.

"Sed certe ĝi ne estas konvena por vi..."

"Ne gravas!" heroe respondas la knabo kaj forportas la volumon, kiu havas la nekompreneblan titolon *Anatomio de Melankolio* de Burton.

Je la sekvanta tago la knabo redonas la tralegitan libron kaj petas, ke oni donu al li la apudstarantan. Ĝi estas pli taŭga — *Komencoj* de Newton. Unu post alia li legas la librojn *Teknika Vortaro* de Jura, *La Perejo de la Roma Imperio* de Gibbon, *Maraj Pioniroj* de Hugo, kaj aliajn. Post tralego de ĉiu libro en la kvin metrojn longa breto, ekregas kaoso en la kapo de la dekdujaraĝa Thomas... Filozofio, medicino, historio, kemio, fiziko, matematiko — kiun sciencon ekamos tiu knabo, naskita en 1847 en la urbeto Milano de la usona ŝtato Ohio? Tiu ĉi knabo ĉeestis nur... la unuan klason, ĉar lia patro estis malriĉa, bankrotinta farmisto. Thomas estis ĉiam malsata, sed ne tiom por pantranĉaĵo, kiom por libroj kaj konoj. Por libroj kaj konoj li estis avida ĝis la fino de sia vivo, eĉ kiam li posedis milionojn... kaj liaj nigraj haroj estiĝis arĝentoblankaj...

En la kupeoj de la vagonaro kiu trapasas Ohion veturas amaso da nekonataj homoj. Inter ili sin traŝovas knabo kun pleto. Sur ĝi estas ĵurnaloj, revuoj, lunĉaĵoj kaj limonado. Sur la lipoj de la kolportisto estas rideto, kaj la kepo, surhavana la kupran blazonon de la fervoja trusto, estas heroe klinigita. Nur en la okuloj oni povas konstati melankolion. Trista estas tiu ĉi "komerca" agado. Tutan tagon kurado kaj monotona lulado. Halto. Stacidomo. Kaj denove la monotona lulado. Sed kion fari? Oni devas labori por vivteni sin...

*Jurnaloj! Lunĉaĵoj! Limonado-o-o!* — estas aŭdebla lia malforta voĉeto en ĉiuj kupeoj.

Tiu ĉi knabo estas nia malnova konatulo de la biblioteko de Port Gurion, Thomas. Nun li estas "komercisto", sed en la lasta vagono de la trajno li aranĝis "presejon", "bibliotekon" kaj "laboratorion". Tie li legas, eks-

perimentas kaj revas pri eldonado de gazeto. Jen pro kio li ĉiam rapidas vendi la stokon kaj reveni en sian regnon. Kaj ĉi-vespere... li finis sian vendadon iom pli frue ol ordinare. Li ĵetas la pleton en angulon kaj serĉas per maltrankvilaj manoj la botelon en kiu estas fosforo. Sed malfeliĉo! La botelo falas sur la plankon kaj la fosforo ekflamas! Inter nuboj kaj flamoj Thomas Edison eliras eksteren kaj falas en la manojn de la furiozigitaj konduktoro. Liaj pezaj pugnoj falas sur la bukloharan kapon, kiu deziras tiom multe scii... La fajron oni rapide estingis, kaj ĉio estus finita nur per la ektimo kaj la bluaĵoj kiuj rapide malaperas de la sidvangoj de ĉiu obstina knabo se la kruela bato ne estus difektinta por ĉiam la aŭdkapablon de Edison.

Surda, senlabora, senmona, li serĉas manieron vivteni sin. Li ricevas laboron kiel telegrafisto en la stacidomo de Port Gurion. Agrable estas labori per morso. La noktoj estas longaj, sed la obeema relajso kantas kaj transportas la pensojn tiel foren. Edison laboras kaj legas. Ĝis kiam la mano premadas la ŝlosilon, la okuloj flugas laŭ la linioj de la malfermita libro aŭ lia menso laboras aktive. Ekzemple... tie ĉi sur la muroj de la stacidomo rampas blatoj. Kion oni povus fari pri tio? Thomas inventas elektran reton, kiu cindrigas tuj la abomenajn insektojn venintajn proksime al li. Ŝerco, al kiu liaj kolegoj ridetas bonanime. Kaj ankoraŭ unu — sed ĝi kostis multon al Edison. — Ĉiu telegrafisto estas devigata, kiam li ne havas laboron, telegrafi al la najbara stacidomo je ĉiu duonhoro la ciferon "ses" por ke oni sciu, ke li ne dormas. Thomas kontaktigas vektorloĝon kun la morsaparato kaj tiu "aŭtomato" sola precize je la fiksita horo telegrafas la kodan signalon. Lasinte sian devon al la elektrokurento kaj al la vektorloĝo, li legas aŭ faras provojn, sen deflanĝigo de lia atento. Saĝa ŝerco! Sed la preciza ĝusteco de la signaloj el Port Gurion igas la ĉefojn dubi. Unu nokton oni ekscias la sekreton kaj la telegrafa kompanio elĵetas Edison sur la straton kun atesto: "Edison ĉiam okupas sin pri bagatelaĵoj."

New York. Edison denove serĉas laboron. Li denove estas malsata kaj liaj vestoj similas ĉifonojn. Li jam estas 23-jara junulo kun saĝa kaj agrabla vizaĝo. Li kredas en sia estonteco, en sia feliĉo, kaj multajn tagojn li vagas en la urbo legante ĉiun anoncon sur la

pordoj de la komercentrepretoj. La mano ludas en la poŝo kun la lasta cendo kaj li ne scias nek kion li manĝos, nek kie li dormos ĉi-vespere. Sur solida kverka pordo estas algluita malgranda anonco:

"Estas serĉata telegrafa teknikisto por riparo de la telegrafaparatoj de la Suda Telegrafa Kompanio." — legas Edison kaj eniras. Li fermas la pordon kaj ekstaras antaŭ la direktoro de la kompanio, sinjoro Kull.

"Sinjoro Kull, mi deziras ripari viajn aparatojn."

Sinjoro Kull senfide rigardas la junulon. Tiom da teknikistoj ne sukcesis! La direktoro leviĝas ĝemante. Forpeli lin? Sed la difektoj estas grandegaj: kvinan tagon la aparatoj silentas.

"Bone! Iru!" Svingas sian grasan manon sinjoro Kull, kaj Edison tuj rapidas al la aparatejo.

Jes, la difektoj estas grandegaj. Kvar tagojn kaj noktojn li pene laboras. La aparatoj ne moviĝas. Je la kvina nokto, ĵus kiam sinjoro Kull intencas forpeli tiun ĉi surdan vagulon, la unua aparato ekfunkcias. Edison "aŭdas" ĝin, ekordinte per la dentoj la lignan plataĵon de la aparato. Lacigite kaj malsata ĝis morto, li ne havas fortojn ĝoji pri sia venko. Lia mano prenas la dek dolarojn donitajn de la direktoro. Ili povas transformiĝi en supon. Saĝgrasa supo! Kaj lito! Pura blanka lito en hotelo. Thomas rapide manĝas kaj enlitiĝas. Sed li ne povas ekdormi. La dormo ne venas. Lia menso okupiĝas obsede pri unu ideo, kiu naskiĝis dum la terura laboro. Kiom interesa ideo! Laboro de la telegrafaparatoj samtempe en du direktoj... Kaj tio ŝparus milionojn al la kompanio! Kaj ankoraŭ ion: oni povus igi la aparatojn skribi anstataŭ punktoj kaj streketoj literojn, kiel homo! Tio ankaŭ kostos milionojn! Sed kion ricevos Edison, se liaj ideoj efektiviĝos? Li denove turniĝas en la lito. Ne, li ne povas ekdormi.

La postan matenon la dika sinjoro Kull denove akceptas Edison. "Saluton, sinjoro Kull — jam ĉiuj viaj aparatoj kantas, mi esperas... Sed ili povus samtempe labori en ambaŭ direktoj! Ili povus skribi senpere literojn! Fidu al mi, sinjoro: mi havas ideon, per kiu vi povus gajni milionojn!"

Sinjoro Kull streĉas sian atenton. Temas pri milionoj. Li aŭskultas kaj palpebrumas. Pro kio li ne provu? Post tri monatoj la telegrafaparatoj de la Suda Telegrafa Kompanio laboras



samtempe en ambaŭ direktoj kaj skribas senpere literojn sur paperon. Edison denove estis laborinta preskaŭ sen ripozo, sed nun li havas en sia poŝo kvardek mil dolarojn. Sed pli grava estas tio, ke li scias kion fari per ili.

Kvardek mil dolaroj sufiĉas por instalado de laboratorio en kvaretaĝa domo apud New York kaj por dungo de kelkaj kunlaborantoj. En la kapo de Edison svarmas ideoj kaj pensoj, kiujn oni devas kontroli kaj efektiviĝi. Edison dronas en laboron. En daŭro de kelkaj jaroj li kreas unu post alia dekojn da inventaĵoj, kiujn li sukcesas transformigi en dolarojn. En 1873 li jam havas novajn laboratoriojn kaj pli ol tricent kunlaborantojn. Li ankaŭ posedas fabrikojn en kiuj oni produktas liajn inventaĵojn. Tiu ĉi homo kiu finis nur la unuan klason gvidas ĉion. Sed kia homo estas Edison! Apenaŭ nun li komencas grandskalan laboron. Investante 400.000 dolarojn en provojn li gajnas 4.000.000! Nun ĉiu supozos ke Edison komencos senzorgan vivon, ke li ripozados.

Ne! al li tia vivo estas fremda. Edison scias nur unu aferon — laboron! Du-

dek horojn en tagnokto! Kaj la rezultoj estas videblaj por ĉiu.

Cu ni detale priskribu la plibonigojn faritajn de Thomas Edison al la telefono, al la kino, al la tajpmaŝino, al la telegrafo, al la aplikado de la elektra lampo, al la radio, pri la invento de la diktafono, fonografo kaj gramofono? Por nomi la preskaŭ mil inventaĵojn kaj plibonigojn de Edison certe ne sufiĉus al ni ĉiujn paĝojn de nia revuo! Sed kie estas la sekreto de tiu ĉi sukcesoj? La ekscio de tiu sekreto estus ege malfacila laboro. Sed jen Edison mem helpas nin: "La talentoj de la homo disvolviĝas en la laboro," li diras. "La genieco konsistas el naŭdek naŭ procentoj da persisto kaj malfacila kaj laciga laboro, kaj nur unu procento da inspiro."


Kaj vere Edison ne hontas labori je iu ajn laboro. Okdek jaraĝa, li estas ankoraŭ en la laboratorio. Li observas, cerbumas, kalkulas, helpas. Unu provon oni devas ripeti. La ujo estas malpura kaj la juna inĝeniero vane serĉas serviston. Li lasas la ujon. Kolerigite, Edison prenas la ujon de la porcelana plataĵo. "Pardonu min: mi ne supozis ke la laboro povas mal-

dignigi... Donu! Mi estas al kutimiĝinta al ĉiaspeca laboro!" kaj li lavas la ujon antaŭ la hontigita juna kunlaboranto. Poste li klarigas al la inĝeniero kiel li devas ripeti la provon kaj foriras...

En 1931 li estas 83-jaraĝa, kiam malsano faligas lin en la liton. Kia malfeliĉo! En la momento li fervore laboras por eltrovi novan manieron por fabrikado de artefarita kaŭĉuko. Ĵus li tralegis tri mil paĝojn el la kemio kaj la fiziko por sia orientiĝo. "Interesa, kaj oni devas halti en la mezo!" grumblas la maljunulo enlite. "Kiom da dolaroj kostus du semajnoj de la vivo?" diras unu el la ŝercoj de Edison.

Sed la vivo ne havas prezon en dolaroj. Kaj Edison bone scias, ke lia ŝerco restas nur ŝerco, dirita inter du atakoj de la febro. La ŝercoj de lia juneco! Tiujn li ankaŭ memoras. Eh! Ĉu ne eblas per miliono da dolaroj aĉeti unu semajnon da vivo? Ne eblas... Sed per mil inventaĵoj kaj plibonigaĵoj oni povas elaĉeti senmortecon! Kaj eĉ sen unu cendo.

**Evgeni Konstantinov**




### Aŭstrujo

Dumnokta skiado sur lumigitaj skivojoj ne estas privilegio nur de unuarangaj konkursoj; ĝi fariĝas tre populara kiel sporto en si mem. Komprenoble, la lumigo de ĉi tiuj vojoj devas esti de la plej alta kvalito. Pro tio la lumigon en multaj vintrosportaj centroj tra la tuta mondo, inkluzive tiun de la Olimpika skisaltejo de Kitzbühel, instalas Philips.

## Fido al **PHILIPS** estas tutmonda




Tage kaj nokte oni uzas sennombrajn, plej diversajn produktojn de Philips en la tuta mondo. Inter ili estas: lumigaj ekipaĵoj, radio-aparatoj kaj televidiloj, gramofondiskoj, aparatoj por la mastrumado, elektraj raziloj, elektrontuboj kaj duonkondukiloj, industriaj kaj sciencaj instrumentoj, telekomunika ekipaĵo, radaro, publikparolaj sistemoj, medicinaj X-radiaj instalaĵoj, kemiaj kaj farmaciaj specialproduktoj.



Diagnostikaj radiologiaj aparatoj de Philips en la hospitalo Jean Talon en Montreal ebligas al la radiologo ekzamenadon per televidigilo kaj distanca manipulado.

**Kanado**



En la uzino de la Companhia Portuguesa de Caminhos de Ferro, nitoveldaj aparatoj de Philips faciligas la fiksadon de nitoj el rustrezista ŝtalo en fervojajn vagonojn.

**Portugalujo**